



# Bulteno de la Londona Esperanto-Klubo

[www.espinfo.org/lek](http://www.espinfo.org/lek)

Majo - Junio 2021

## Kluba programo:

### Majo:

7. **Lars Sözüer:** Biciklaj ekskursoj dum la vintro.



14. **Anna Lowenstein:** Mia nova romano: Agrippina.



21. **Ewa Caban:** Lignaj preĝejoj de Supra Silezio



28. **John Wells:** Kiam la latina skribo ne sufiĉas.



### Junio:

4. **Martin Taylor:** Hipnotismo.



11. **Klaas Dijkstra:** Taga ekskurso al Terschelling (NL) (virtuala gvidado).



18. **Trevor Steele:** Ĉu indiĝenaj vivoj gravas?

25. Jarkunveno.



## Loko, horaro kaj aliaj informoj:

Ni kunvenas vendredvespere. Dum la kronviroza krizo, kunvenoj okazas per la reta sistemo Zoom, komenciĝante je 19h (UTC+1). Kunvenoj ĉe Old Diorama Arts Centre ankoraŭ ne povas okazi. Eble ili rekomenciĝos iam en la somero. Novaj spektuntoj bonvolu peti ligilon al proksim-vendreda Zoom-renkontiĝo de [lek.sekretario@gmail.com](mailto:lek.sekretario@gmail.com). Haveblas ankaŭ, ĉe Jutubo, registraĵoj de prezentoj jam okazintaj. Vizitu [espinfo.org/](http://espinfo.org/) lekrano

Londona  
Esperanto-Klubo

## Leteroj de la konsilantaro

### Mesaĝo de la vicprezidanto:

Karaj membroj, Ni jam preterpasis unu jaron de la transmonda pandemio. Kvankam kelkaj limoj pri ĉeesta sociumado malaperis – eĉ je la datoj planitaj de la registaro – la Londona Esperanto-Klubo ankoraŭ kunvenas per Zoom. Iusensce, tio estas avantaĝo por la klubo ĉar plurdekoj da homoj povas partopreni, kompare kun la ĉeestaj kunvenoj. Dum ni havas la eblon por foraj membroj kaj nemembroj partopreni, mi volas aparte danki al ili por ilia subteno dum la lastaj monatoj. Pri la lastatempaj kunvenoj: antaŭ du semajnoj, Istvan Ertl

prezentis al ni la libron de aŭstra verkisto Clemens Setz, "Die Bienen und das Unsichtbare" (La abeloj kaj la nevidebla). Plej laste, Lars Sözüer rakontis al ni ne nur pri la *Biciklista Esperantista Movado Internacia* kaj ĝiaj aktivaĵoj biciklaj, sed ankaŭ pri floroj kaj svisaj burokrataĵoj. Nome de la konsilantaro, mi volas specife atentigi, ke spite la ŝajnprogreson de reveno al normaleco, ni ankoraŭ ne havas datojn je kiuj ni povas renkontiĝi denove, sed ni anoncos en la bulteno sufiĉe antaŭ ol tio ŝanĝiĝos. Ĝis tiam ni restos en virtuala mondo.



Matt Peperell

## El Londono por la mondo

Ĉu vi scias pri la facillingva retejo de UEA redaktita en Londono kaj intencita por lernantoj? Se vi ne jam scias, vi trovos ĝin ĉe [uea.facila.org](http://uea.facila.org).

*uea.facila* estas celita ne al instruistoj, sed al lernantoj – sed kompreneble multaj instruistoj jam trovas ĝin utila, ĉar ĝi enhavas

 **uea.facila**

multajn mallongajn artikolojn taŭgajn por prezento dum Esperanto-leciono.

La artikoloj konsistas ĉefe el novaĵoj kaj informoj pri la Esperanto-movado, sed estas ankaŭ ĝeneralaj legaĵoj, facillingvaj filmetoj, kalendaro de estontaj kunvenoj

pago 2 ➔



kaj aliaj. Estas grave, ke la legantoj ne nur pasive legu, sed sentu sin parto de la afero, do ili havas eblecon komenti sub la artikoloj, prezenti sin en la paĝo “Niaj legantoj”, kaj sendi mallongajn raportojn kaj fotojn pri lokaj agadoj. Jam aperis pluraj artikoloj pri agadoj en Londono.



La facila lingvaĵo de la artikoloj estas bazita sur la iama vortlisto de *Kontakto*, nun reviziita. Aldonitaj vortoj rilatas plejparte al komputado kaj Interreto, dum estis forigitaj kelkaj vortoj, kiuj ne ofte estas bezonataj en tia retejo. La reviziita vortlisto troviĝas ĉe: [uea.facila.org/vortlisto/](http://uea.facila.org/vortlisto/)

Ĉiuj artikoloj estas mallongaj kun ne pli ol 400 vortoj. Lernantoj ne volas legi longajn artikolojn! Nur la rubriko “Legajoj” rajtas akcepti iom pli longajn artikolojn, ĝis maksimume 600 vortoj.

*uea.facila* kunlaboras kun ILEI kaj *Juna amiko*. Ĝi jam aperigis kelkajn artikolojn el *Juna amiko*, kies redaktoro kompreneble estas invitita reciproke utiligi artikolojn el *uea.facila*.

Kiel la membroj de la Londona Esperanto-Klubo povas kunlabori kun la nova retejo? En pluraj manieroj. Unue, legu ĝin ĉe [uea.facila.org](http://uea.facila.org). Poste, prezentu ĝin al viaj esperantistaj konatoj kaj lernantoj kaj kuraĝigu ilin mem legi ĝin. Proponu al ili, ke ili sendu sian sinprezenton kun foto por la rubriko “Niaj legantoj”, kaj ke ili aldonu komentojn sub la artikoloj.

Krome mi, kiel redaktoro, bonvenigos kontribuojn de la membroj de LEK. Ne maltrankviliĝu se estas malfacile por vi verki facile: mi mem volonte redaktos kaj simpligos artikolojn senditajn. Mi ĉiam tamen petos aprobon de la verkinto antaŭ ol aperigi redaktitan artikolon sub ties nomo.



Anna Lowenstein  
anna.lowenstein@esperanto.org



## Londona Esperanto-Klubo

### Funkciuloj (Ankoraŭ rolantaj pro neokazo de jarkunsido de LEK en marto 2020)


Honora Prezidanto: Prof. John Wells;  
Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.  
Konsilantaro: Chris Lewis (Prezidanto), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Renato Corsetti (Sekretario kaj Programo), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Antony Rawlinson, Anthony Bodineau, Roland England, Terry Page. Maurizio Giacometto (Kompilisto de la Bulteno).



## Enigmoj



### Deko da... Legomoj!



**Kion fari:** Serĉu 10 radikojn\* kiuj nomas legomon. Ili povas aperi vertikale aŭ horizontale (sed ne diagonale) laŭ ordo normala aŭ inversa. Ĉiu radiko komenciĝas per litero majuskla, ceteraj literoj estas senescepte minusklaj. Por kontroli ĝustecon de radikoj kiujn vi trovis, skribu ĉiun en la suban ĉelaron. La nombro da vakaj ĉeloj, kaj iuj vokaloj jam presitaj, helpas fari tion senerare. La 10 literoj en unike kompleta kolumno de plenigita ĉelaro nomas **eminentan ĵurnaliston**.

\* Radiko estas vortero sen afiksoj kaj sen gramatika finaĵo. Ekzemple, la radiko de “ĉelaro” estas “ĉel”.